

Samploj de Verkata Esperantigo de la Korano

SURAOJ

Surao 1a	La Malfermo	7 v.	1
Surao 3a*	La Gento de Amram	55 v.	2
Surao 12a*	Jozefo	13 v.	6
Surao 16a*	La Abelso	25 v.	7
Surao 49a	La Loĝejoj	18 v.	9
Surao 55a	La Gracema	78 v.	11
Surao 65a	La Eksedziĝo	12 v.	14
Surao 81a	La Envolviĝo	29 v.	16
Surao 85a	La Signoj de la Zodiako	22 v.	17
Surao 86a	La Nokta Vizitanto	17 v.	18
Surao 90a	La Lando	20 v.	19
Surao 91a	La Suno	15 v.	20
Surao 93a	La Brila Antaŭtagmezo	11 v.	21
Surao 94a	La Larĝigo	8 v.	22
Surao 95a	La Figo	8 v.	23
Surao 96a	La Buleto	19 v.	24

Surao 107a	La Afablaĵo	7 v.	25
Surao 108a	La Abundo	3 v.	26

ALDONOJ

Aldono 1a	<i>Allāh ar-Raḥmān ar-Raḥīm</i>	27
-----------	---------------------------------	----

* Ĝis nun ne finita (26/12/2019)

SURAO 1A

LA MALFERMO

Al-Fātiḥah, ĉe Mekko

¹ Je la nomo de Dio, la Gracema, la Kompatema; ² la laŭdo estu al Dio, Sinjoro de la mondoj, ³ la Gracema, la Kompatema, ⁴ Reĝo de la tago de juĝo. ⁵ Vin ni adoras kaj al Vi ni petas helpon. ⁶ Gvidu nin sur la rektan vojon, ⁷ la vojon de tiuj, al kiuj Vi donis favoron, ne de tiuj, kiuj gajnas koleron, kaj ne de tiuj, kiuj devojiĝas.

1. Legu la aldonon 1an, p.25.

4. *Maliki* „reĝo“ : el la sep plej akceptitaj manieroj de recitado, Āšim kaj al-Kisā'ī uzas la prononcon *mālīki*, „Majstro.“

SURAO 3A

LA GENTO DE AMRAM

'Āl 'Imrām, ĉe Mekko

Je la nomo de Dio, la Gracema, la Kompatema

¹ *Alef Lam Mim.* ² Dio, ne estas dio krom Li, la Vivanta, la Daŭra. ³ Jozef kaj siaj fratoj estis signoj por la demandantoj Jozef kaj siaj fratoj estis signoj por la demandantoj, konfirmante tiun, kiu estis antaŭ ĝi, kaj Li sendis malsupren la Toraon kaj la Evangelion, ⁴ antaŭe, kiel gvidilo por la homoj, kaj Li sendis malsupren la Kriterion. Tiuj, kiuj forĵuris la signojn de Dio, por ili ja estas severan punon. Dio estas potenca, venĝema. ⁵ Dio, nenio estas kaŝita antaŭ Li, io ajn aŭ sur la tero aŭ en la ĉielo. ⁶ Estas Li, kiu formas vin en la uteroj kiel Li volas. Ne estas dio krom Li, la Potenca, la Saĝa.

⁷ Estas Li, kiu malsupren sendis al vi la Libron, el kiu estas signoj klaraj, ili estas la bazo de la Libro, kaj aliaj estas plursencaj. Kaj pri tiuj, en kies koroj estas malrekteco, ili sekvas tion, kio estas plursenca el ĝi, serĉante disigon kaj serĉante la interpreton, sed neniu scias la interpreton krom Dio kaj tiuj, kiuj estas fortika en scio. Ili diras: „Ni kredas je ĝi, ĉio estas de nia Sinjoro,“ sed neniu atentis krom homoj prudentaj. ⁸ Nia Sinjoro, Ne malrektigu niajn korojn post kiam vi gvidis nin, kaj donacu al ni gracon el Vi; Vi estas ja la Donacanto. ⁹ Nia Sinjoro, Vi certe kunvenigos la homaron en tago, sen dubo pri ĝi. Dio ja ne rompas la promeson.

¹⁰ Tiuj, kiuj forĵuris, ja neniam helpos ilin la havaĵoj nek la filoj antaŭ Dio. Ili estos brulaĵoj por la fajro. ¹¹ Kiel la kazo de la popolo de Faraono kaj tiuj, kiuj estis antaŭ ili. Ili malkonfesis Niajn signojn, do Dio trafis ilin pro iliaj kulpoj; Dio estas severa en la punado. ¹² Diru al tiuj, kiuj forĵuris: „Vi venkiĝos kaj kuniĝos en la infero, malbona kuŝejo!“ ¹³ Certe jam estis signoj por vi en la du armeoj, kiuj batalis: unu armeo batalanta sur la vojo de Dio, kaj la alia forĵuranta; Ili vidis ilin kiel duoble de si per la vidpovo de la okuloj. Kaj Dio do plifortigas per Sia helpo, kiun Li volas. En tio ja estas lecono por tiuj, kiuj havas la vidpovon.

¹⁴ Beligita por la homoj estas la amo al la deziroj, al la virinoj, kaj al la filoj, kaj al la propraĵoj amasigitaj el oro kaj arĝento, kaj al la ĉevaloj bone dresitaj, kaj al la bestaroj kaj kamparoj. Tio estas provizaĵo de la vivo de la mondo, sed Dio, kun Li estas bonega loĝejo. ¹⁵ Diru: „Ĉu mi diru al vi pli bonan novaĵon ol tio?“ Por tiuj, kiuj estis virta, kun sia Sinjoro estas ĝardenoj, sub kiuj fluas riveroj, por resti tie, kaj puraj geedzoj kaj la bonvolo de Dio. Kaj Dio estas vidanto al la servantoj, ¹⁶ kiuj diras: „Nia Sinjoro, ni ja kredas do pardonu al ni niajn pekojn kaj protektu nin kontraŭ la puno de la fajro,“ ¹⁷ la persistemajn, kaj la sincerajn, kaj la obeemajn, kaj la elspezantojn en almozo, kaj tiujn, kiuj petas pardonon antaŭ la tagiĝo. ¹⁸ Atestas Dio, ke ne estas dio krom Li—ankaŭ la anĝeloj kaj tiuj, kiuj posedas la scion—subtenante la justecon, ke ne estas dio krom Li, la Potenca, la Saĝa. ¹⁹ La religio ĉe Dio estas ja la submetiĝo, kaj ne malkonsentis tiuj, kiuj ricevis la Libron, post kiam al ili venis la scio, krom per ĵaluzo inter ili. Kaj pri tiu, kiu forĵuras la signojn de Dio, Dio do estas rapida en la enkalkulado. ²⁰ Se do ili disputas kun vi, diru: „Ni submetiĝis antaŭ Dio, ankaŭ tiuj, kiuj sekvas min,“ kaj diru al tiuj, kiuj ricevis la Libron, kaj al la malkleruloj: „Ĉu vi submetiĝis?“ Se ili submetiĝis, certe ili gvidiĝas. Sed se ili sin forturnas, vi nur devis transdoni la mesaĝon. Kaj Dio estas vidanto al Siajn servantojn.

²¹ Ja tiuj, kiuj forĵuras la signojn de Dio, kaj mortigas la profetojn senrajte, kaj mortigas tiujn, kiuj ordonas la justecon inter la homoj, vi ja anoncu al ili doloran punon. ²² Estas tiuj, kies verkoj vaniĝas en la mondo kaj en la Venonta, kaj por ili ne estos helpantoj. ²³ Ĉu vi ne vidis tiujn, kiuj ricevis parto de la Libron? Ili vokiĝis al la Libro de Dio, por ke ĝi juĝi inter ili, kaj jen, iuj el ili sin forturnas; ili estas malŝatantoj. ²⁴ Tio estas ĉar ili diras: „La fajro ne tuŝos nin krom dum tagoj kalkulitaj.“ Kaj trompis ilin en ilia religio tio, kion ili inventis. ²⁵ Kiel? Kiam Ni kunigos ilin en tago, sen dubo pri ĝi, pagiĝos ĉiu animo pro kion ĝi gajnis, kaj ili ne traktiĝos maljuste.

²⁶ Diru: „Ho Dio, Majstro de la regno, Vi donas la regnon al kiu Vi volas, kaj Vi forprenas la regnon de kiu Vi volas, kaj Vi plialtigas kiun Vi volas, kaj Vi humiligas kiun Vi volas. En Via mano estas la bono. Super ĉiu Vi estas ja kapabla.“ ²⁷ Vi enigis la nokton en la tagon, kaj Vi enigis la tagon en la nokton, Vi eligas la vivantojn el la mortintojn, kaj Vi eligas la mortintojn el la vivantoj, kaj Vi provizos por tiu, kiun Vi volas, sen kalkulo.

²⁸ La kredantoj ne prenu la forĵurantojn kiel aliananojn anstataŭ la

kredantojn, kaj kiu tion faras ne estas kun Dio en io ajn, krom ke vi timas ilian timigon. Dio avertas vin pri Si, kaj al Dio estas la reveno.²⁹ Diru: „Ĉu vi kaŝas tion, kio estas en viaj brustoj, ĉu vi ĝin malkaŝas, Dio ĝin scias, kaj Li scias tion, kio estas en la ĉieloj, kaj tion, kio estas sur la tero. Kaj Dio estas kapabla sur ĉio.“³⁰ En la tago, ĉiu animo trovos tion, kion ĝi faris el boneco, prezentita, kaj tion, kion ĝi faris el malboneco, kaj ĝi deziras, ke estu granda spaco inter si kaj tio. Dio avertas vin pri Si, kaj Dio estas bonvola al Siaj servantoj.

³¹ Diru: „Se vi amas Dion, sekvu min. Dio amos vin kaj pardonos al vi viajn pekojn. Dio estas pardonema, kompatema.“³² Diru: „Obeu Dion kaj la Senditon.“ Se do ili sin forturnas, Dio ne amas la forĵurantojn.³³ Dio ja elektis Adamon, kaj Noan, kaj la genton de Abraham, kaj la genton de Amram super la mondoj,³⁴ idaro, unu de la alia, kaj Dio estas aŭdanto kaj scianto.

³⁵ Kiam la edzino de Amram diris: „Mia Sinjoro, mi ja votis al Vi tion, kio estas en mia utero, dediĉita. Akceptu do ĝin de mi. Vi estas ja aŭdanto, scianto,“³⁶ kaj kiam ŝi naskis ŝin, ŝi diris: „Mia Sinjoro, mi naskis inon,“—sed Dio bone sciis, kion ŝi naskis, kaj la masklo ne estas kiel la ino—„kaj ke mi nomis ŝin Maria, kaj mi serĉas rifuĝon kun Vi por ŝi kaj ŝia idaro kontraŭ Satano la ŝtonumita.“³⁷ Ŝia Sinjoro do akceptis ŝin kun bona akceptado, kaj kreskigis ŝin kun bona kreskigo, kaj konfidis ŝin al Zeharja. Kaj Kiam Zeharja eniris ĉe ŝi en la sanktejo, li trovis provizon kun ŝi. Li diris: „Ho Maria, de kie ĉi tio estiĝis por vi?“ Ŝi diris: „Ĉi tio estas de Dio.“ Dio ja donas provizon al tiu, kiun Li volas, sen kalkulo.

³⁸ Tiam alvokis Zeharja sian Sinjoro; li diris: „Mia Sinjoro, donacu al mi idaron puran de Vi mem. Vi estas ja aŭdanto de alvokoj.“³⁹ Kaj vokis la anĝeloj, dum li staris preĝante en sia sanktejo: „Dio ja donas al vi la bonan novaĵon pri Johano, konfirmante vorton de Dio, nobla, ĉasta, kaj profeto inter la justuloj.“⁴⁰ Li diris: „Sinjoro, kiel estiĝos filo por mi? Mi fariĝis ja maljuna, kaj mia edzino estas nefekunda.“ Li diris: „Tiel estas; Dio faras, kion Li volas.“⁴¹ Li diris: „Sinjoro, asignu por mi signon.“ Li diris: „Via signo estas, ke vi ne parolu al la homoj tri tagojn krom per gestoj. Kaj memoru vian Sinjoron multe, kaj laŭdegu Lin vespere kaj matene.“

⁴² Kaj kiam la anĝeloj diris: „Ho Maria, Dio ja elektis vin, kaj purigis vin, kaj elektis vin super la virinoj de la mondoj.“⁴³ Ho Maria, estu obe-

ema al via Sinjoro, kaj terenkuŝiĝu, kaj kliniĝu kun tiuj, kiuj kliniĝas.“⁴⁴ Tio estas el la novaĵoj de la mistero; Ni revelacias ĝin al vi. Kaj vi ne estis kun ili, kiam ili lotis ĵetante kanojn, pri kiu el ili prizorgus Marian, kaj vi ne estis kun ili, kiam ili disputis.⁴⁵ Kiam la anĝeloj diris: „Ho Maria, Dio donas ja al vi bonan novaĵon pri vorto de Li: lia nomo estas la Mesio, Jesuo, filo de Maria, honorata en la mondo, kaj en la Venonta, el tiuj alproksimigitaj al Dio.“⁴⁶ Kaj li parolos al la homoj en la lulilo, kaj en plenkreskeco: li estos el la justuloj.“⁴⁷ Ŝi diris: „Sinjoro, kiel estiĝos filo por mi, kvankam viro ne tuŝis min?“ Li diris: „Tiel Dio kreas, kion Li volas. Kiam Li dekretas aferon, poste Li nur diras al ĝi: ‚Estu!‘ kaj ĝi estas.“⁴⁸ Kaj Li instruos al li la Libron, kaj la saĝon, kaj la Toraon, kaj la Evangelion,⁴⁹ kaj li estos Sendito al la idoj de Izrael: „Mi ja venis al vi kun signo de via Sinjoro: ke mi formas por vi la formon de birdo el argilo, kaj poste mi spiras en ĝi, kaj ĝi estiĝas birdo per la permeso de Dio. Kaj mi kuracas la blindulojn kaj la leprulojn, kaj mi revivigos la mortintojn per la permeso de Dio. Kaj mi sciigos al vi, pri kion vi manĝas, kaj pri kion vi rezervas en viaj domoj. En tio ja estas signo por vi, se vi estas kredantoj.“⁵⁰ Kaj konfirmante tion, kio estis antaŭ mi el la Torao, kaj mi laŭleĝigas ion el tioj, kioj estis malpermesitaj al vi, kaj mi venis al vi kun signo de via Sinjoro, do konsciuj Dion, kaj obeu min.⁵¹ Dio estas ja mia Sinjoro kaj via Sinjoro, do adoru Lin. Ĉi tio estas vojo rekta.“

⁵² Kaj kiam Jesuo perceptis ilian forĵuron, li diris: „Kiuj estos miaj helpantoj ĉe Dio?“ La disĉiploj diris: „Ni estos helpantoj de Dio. Ni kredas je Dio, kaj vi atestu, ke ni estas submetiĝantoj.“⁵³ Nia Sinjoro, ni kredas je tio, kion Vi malsupren sendis, kaj ni sekvas la Senditon. Do enskribu nin inter la atestantoj.“⁵⁴ Ili do projektis, sed Dio projektis, kaj Dio estas la plej lerta projektanto.

⁵⁵ Kiam Dio diris: „Ho Jesuo, Mi igos vin morti, kaj levos vin al Mi, kaj purigos vin de kiuj forĵuris, kaj metos kiuj sekvis vin super kiuj forĵuris en la tago de la reviviĝo. Tiam vi revenos al Mi, kaj mi juĝos inter vi pri kion vi malkonsentis.“

Daŭrigote

SURAO 12A

JOZEF O

Yūsuf, ĉe Mekko

Je la nomo de Dio, la Gracema, la Kompatema

¹ *Alef Lam Ra.* Ĉi tiuj estas la signoj de Libro klara. ² Ni ja sendis malsupren ĝin, Reciton arablingvan, por ke vi kompenu. ³ Ni rakontas al vi la plej belan rakonton, el kion Ni revelaciis al vi, ĉi tiu Recito, kvankam vi antaŭe estis unu el la nesciantoj.

⁴ Kiam Jozef diris al sia patro: „Ho mia patro, mi vidis ja dekunu stelojn, kaj la sunon, kaj la lunon; mi vidis ilin terenkuŝiĝi antaŭ mi.“ ⁵ Li diris: „Ho mia filo, ne rakontu vian vizion al viaj fratoj, por ke ili ne projektus projekton kontraŭ vi. Satano ja estas malamiko evidenta al la homo.“

⁶ Tiel via Sinjoro elektos vin, kaj instruos al vi la interpreton de la paroloj, kaj plenumos Sian gracon por vi kaj por la gento de Jakob, kiel Li plenumis ĝin por viaj prapatroj antaŭe, Abraham kaj Isaak. Via Sinjoro estas ja scianta, saĝa.“

⁷ Certe en Jozef kaj siaj fratoj estis signoj por la demandantoj. ⁸ Kiam ili diris: „Certe Jozef kaj lia frato estas pli karaj al nia patro ol ni, kvankam ni estas partio. Nia patro estas ja en eraro evidenta. ⁹ Mortigu Jozefon aŭ forpelu lin al lando, por ke malokupiĝos la vizaĝo de via patro por vi, kaj vi estos poste popolo justa.“ ¹⁰ Diris unu el ili: „Ne mortigu Jozefon, sed ĵetu lin en la fundon de puto; iu el la karavano elirigos lin, se vi tion faros.“

¹¹ Ili diris: „Ho nia patro, kial vi ne konfidas Jozefon al ni? Ni ja estas bondezirantoj por li. ¹² Sendu lin morgaŭ kun ni, por amuzado kaj ludado. Ni ja estos gardantoj por li.“ ¹³ Li diris: Ja min malĝojigas, ke vi forkondukus lin, kaj mi timas, ke lupoj manĝos lin, dum vi estus malatenta.“

Daŭrigote

SURAO 16A

LA ABELO

An-Nahm, ĉe Mekko

Je la nomo de Dio, la Gracema, la Kompatema

¹ La ordono de Dio venas, do ne klopodu akceli ĝin. Preter asocio estas Li kaj eminenta super tio, kion ili asocias kun Li. ² Li sendas malsupren la anĝelojn kun la Spirito de Sia ordono, al tiuj, kiujn Li volas el Siaj servantoj: „Admonu ke ne estas dio krom Mi, do estu virtaj antaŭ Mi.“ ³ Li kreis la ĉielojn kaj la teron en la vero. Eminentaj estas Li super tio, kion ili asocias kun Li. ⁴ Li kreis la homon el spermero kaj jen, li estas evidenta disputanto.

⁵ Kaj Li kreis la brutaron; en ĝi estas varmo, kaj utilo, kaj el ĝi vi manĝas, ⁶ kaj en ĝi estas beleco por vi, kiam vi ilin enirigas, kaj kiam vi ilin elirigas, ⁷ kaj ili portas viajn ŝarĝojn en landon, kiun vi ne povus atingi sen grava penado por vi mem. Via Sinjoro estas ja tenera, kompatema. ⁸ Kaj ĉevalojn, kaj mulojn, kaj azenojn (*Li kreis*), por ke vi rajdu sur ili, kaj kiel ornamaĵo, kaj Li kreas kion vi ne scias. ⁹ Ĉe Dio estas la montrilo de la vojo, kaj inter ili estas iuj, kiuj malrektiĝas. Se Li volus, Li gvidus vin ĉiujn.

¹⁰ Estas Li, kiu sendas el la ĉielo akvon; el ĝi estas trinkaĵo, kaj per ĝi estas arboj, apud kiuj vi paŝtas. ¹¹ Kaj per ĝi Li ĝermigas la rikoltaĵon por vi, kaj la olivon, kaj la daktilpalmon, kaj la vinberon, kaj la fruktojn ĉiuspecajn. En tio ja estas signo por popolo, kiu pripensas. ¹² Li servigas al vi la nokton kaj la tagon kaj la sunon kaj la lunon, kaj la steloj estas servemaj pro Lia ordono. En tio ja estas signo por popolo, kiu rezonas. ¹³ Kaj tio, kion Li multigis por vi sur la tero estas diversa laŭ la koloro. En tio ja estas signo por popolo, kiu memoras. ¹⁴ Estas Li, kiu servigas al vi la maron, por ke vi manĝu el ĝi freŝan karnon, kaj por ke vi estigu el ĝi ornamaĵojn, kiujn vi portas—kaj vi vidas la ŝipojn sulki ĝin—kaj por ke vi serĉu Lian gracon, kaj por ke vi estu dankaj. ¹⁵ Li starigis montojn senmovajn sur la tero, por ke ĝi ne skuiĝu kun vi, kaj riverojn kaj vojojn, por ke vi gvidiĝu, ¹⁶ kaj montrilojn de la vojo; per ili kaj per la steloj ili gvidiĝas. ¹⁷ Ĉu Tiu, kiu kreas, estas kiel tiu, kiu ne kreas?

Ĉu vi do ne memoras? ¹⁸ Se vi nombrus la favorojn de Dio, vi ne komputus ilin. Dio estas ja la pardonema, la kompatema.

¹⁹ Kaj Dio scias kion vi kaŝas kaj kion vi malkaŝas. ²⁰ Tiuj, kiujn ili vokas apud Dio, kreas nenion, kaj ili estas mem kreitaj, ²¹ mortintaj, ne vivantaj, kaj ili ne scias, kiam ili leviĝos. ²² Via Dio estas unu Dio. Kaj tiuj, kiuj ne kredas je la venonta, ties koroj malkonfesas, kaj ili estas fieraj. ²³ Ne estas dubo, ke Dio scias kion ili kaŝas kaj kion ili malkaŝas. Li ja ne amas la fierulojn. ²⁴ Kaj kiam oni diras al ili: „Kion sendis via Sinjoro?“ Ili diras: „Fabelojn de la antikvaj,“ ²⁵ por ke ili portu siajn tutajn ŝarĝojn en la tago de la reviviĝo kaj el la ŝarĝoj de tiuj sen scio, kiujn ili devojiĝis. Ho, malbonega estas tio, kion ili portas!

Daŭrigote

LA LOĜEJOJ

*Al-Hujurāt, ĉe Medino**Je la nomo de Dio, la Gracema, la Kompatema.*

¹ Ho vi, kiuj kredas, ne antaŭigu vin en la ĉeesto de Dio kaj Sia Sendito, kaj estu virtaj antaŭ Dio; Dio estas aŭdanto, scianto. ² Ho vi, kiuj kredas, ne laŭtigu viajn voĉojn super la voĉo de la Profeto, kaj ne estu laŭta en parolado kiel la laŭteco de iuj el vi unu al la alian, por ke ne vaniĝu viaj faroj, dum vi ne perceptas. ³ Tiuj, kiuj mallaŭtigas siajn voĉojn apud la Sendito de Dio, estas tiuj, kies korojn Dio provis en virto. Por ili estas pardono kaj rekompenco. ⁴ Tiuj, kiuj vokas vin malantaŭ la loĝejoj (*ho Profeto*), la plejparto de ili ne komprenas. ⁵ Kaj se ili estus pacienca, ĝis vi eliras al ili, tio estus pli bone por ili; sed Dio estas pardonema, kompatema. ⁶ Ho vi, kiuj kredas, se malvirtulo venas al vi kun novaĵo, kontrolu ĝin, por ke vi ne afliktu popolon nesciante kaj poste pentu, pri kion vi faris. ⁷ Kaj sciu, ke inter vi estas la Sendito de Dio. Se li obeus vin pri multaj aferoj, certe vi angoriĝus. Sed Dio agrabligis la kredon al vi kaj beligis ĝin en viaj koroj, kaj malamindigis al vi la forĵuron, kaj la malvirton, kaj la malobeon. Tiuj estas ili, kiuj sekvas la rektan vojon, ⁸ abundo de Dio kaj favoro, kaj Dio estas scianto kaj saĝa. ⁹ Kaj se du partioj el la kredantoj batalus, faru pacon inter ambaŭ ili. Sed se unu el ili ekcesas kontraŭ la alia, batalu do tiu, kiu ekcesas, ĝis ĝi revenas al la ordono de Dio. Kaj se ĝi revenus, faru pacon inter ambaŭ ili laŭ justeco, kaj estu justa. Dio amas la justulojn. ¹⁰ La kredantoj estas nur fratoj, do faru pacon inter ambaŭ viaj fratoj kaj estu virtaj antaŭ Dio, por ke estu kompato al vi.

¹¹ Ho vi, kiuj kredas, popolo ne moku popolon; eble estas, ke ili estas pli bonaj ol ili. Kaj virinoj ne moku virinojn; eble estas, ke ili estas pli bonaj ol ili. Kaj nek kalumniu nek voku unu la aliajn per moknomoj. Malbona estas la nomo de la malvirto post la kredo. Kaj kiu ajn ne pentas, tiuj estas la malutiluloj. ¹² Ho vi, kiuj kredas, evitu multe da suspekto; iom da suspekto estas peko. Kaj nek spionu nek klaĉu pri unu la alia. Ĉu unu el vi amus manĝi la

karnon de sia frato mortinta? Vi abomenus ĝin. Kaj estu virtaj antaŭ Dio. Dio estas indulgema, kompatema.¹³ Ho homaro, Ni kreis vin el virseksulo kaj virinseksulo, kaj faris vin konfederacioj kaj triboj, por ke vi ekkonu unu la alian. La plej nobla el vi antaŭ Dio estas la plej virta el vi. Dio estas scianto kaj konanto.¹⁴ La araboj de la dezerto diras, „Ni kredas.“ Diru (*ho Profeto*), „Vi ne kredas, sed diru, „Ni submetiĝis,‘ kaj la kredo ankoraŭ ne eniris en viajn korojn.“ Sed se vi obeus Dion kaj Sian Senditon, Li ne malpliigos nenion el viaj aferoj; Dio estas pardonema, kompatema.¹⁵ La kredantoj estas nur tiuj, kiuj kredas je Dio kaj Sia Sendito, poste ne dubas, kaj luktas per siaj riĉaĵoj kaj siaj memojoj en la vojo de Dio. Tiuj estas la sinceruloj.¹⁶ Diru, „Ĉu vi instruus Dion pri via religio, dum Dio scias tion, kio estas en la ĉieloj kaj kio estas en la tero. Kaj Dio pri ĉio estas scianto.“¹⁷ Ili rigardas kiel favoro al vi, ke ili submetiĝis. Diru „Ne rigardu vian submetiĝon kiel favoro al mi. Ne, male Dio donis favoron al vi ĉar Li gvidis vin al la kredo, se vi estas sinceraj.“¹⁸ Dio scias la misteron de la ĉieloj kaj la tero, kaj Dio estas Vidanto de tio, kion vi faras.

1. *Bayna yadayi llāhi wa-rasūlibi*, „en la ĉeesto de Dio kaj Sia Sendito,“ laŭvorte „inter la manoj de...“

SURAO 55A

LA GRACEMA

Ar-Raḥmān, ĉe Mekko

Je la nomo de Dio, la Gracema, la Kompatema.

¹ La Gracema ² instruis la Reciton, ³ kaj kreis la homon, ⁴ kaj instruis al li la esprimadon. ⁵ La suno kaj la luno (*kur*as) laŭ mezuro, ⁶ kaj la herboj kaj la arboj terenkuŝiĝas. ⁷ Kaj la ĉielon Li altigis, kaj Li difinis la pesilon, ⁸ por ke vi ne ekcesu la pesilon, ⁹ kaj fondu la peson juste, kaj ne ŝparu la pesilon. ¹⁰ La teron li etendis por la estaĵoj; sur ĝi estas fruktoj, kaj palmoj, kiuj havas spikingojn, ¹² kaj la greno havanta ŝelojn, kaj la aromaj kreskaĵoj. ¹³ Kiujn el la favoraĵoj de via Sinjoro vi ambaŭ do malkonfesos?

¹⁴ Li kreis la homon el seka argilo kiel ceramikaĵon, ¹⁵ kaj Li kreis la genion el la fajro senfuma. ¹⁶ Kiujn el la favoraĵoj de via Sinjoro vi ambaŭ do malkonfesos? ¹⁷ Sinjoro de ambaŭ orientoj kaj Sinjoro de ambaŭ okcidentoj (*estas Li*). ¹⁸ Kiujn el la favoraĵoj de via Sinjoro vi ambaŭ do malkonfesos?

¹⁹ Li liberigis la du marojn renkontantajn; ²⁰ inter ili estas baro, kiun ili ne transpasos—²¹ kiujn el la favoraĵoj de via Sinjoro vi ambaŭ do malkonfesos?—²² el la du venas perloj kaj koraloj. ²³ Kiujn el la favoraĵoj de via Sinjoro vi ambaŭ do malkonfesos? ²⁴ Kaj Lia estas la ŝipoj altaj sur la maro kiel montoj. ²³ Kiujn el la favoraĵoj de via Sinjoro vi ambaŭ do malkonfesos?

²⁶ Ĉio, kio estas sur (*la tero*) estas pasema, ²⁷ sed restos la vizaĝo de via Sinjoro, la posedanto de la majesteco kaj de la honoro. ²⁸ Kiujn el la favoraĵoj de via Sinjoro vi ambaŭ do malkonfesos? ²⁹ Petas al Li ĉiu, kiu estas en la ĉielo kaj sur la tero; ĉiutage Li estas en verko. ³⁰ Kiujn el la favoraĵoj de via Sinjoro vi ambaŭ do malkonfesos?

³¹ Baldaŭ Ni zorgos pri ambaŭ vi, ho du pezuloj! ³² Kiujn el la favoraĵoj de via Sinjoro vi ambaŭ do malkonfesos? ³³ Ho kunveno de la genio kaj la homo, se vi kapablas iri trans la limojn de la ĉielo kaj de la tero, iru! Vi ne kapablos iri sen permeso. ³⁴ Kiujn el la favoraĵoj de via Sinjoro vi ambaŭ do malkonfesos?

³⁵ Sendiĝos kontraŭ ambaŭ vi flamo el fajro kaj fumo, kaj vi ambaŭ ne kapablos helpi vin. ³⁶ Kiujn el la favoraĵoj de via Sinjoro vi ambaŭ do malkonfesos? ³⁷ Kaj kiam la ĉielo fendiĝos kaj fariĝos ruĝa kiel led—³⁸ kiujn el la favoraĵoj de via Sinjoro vi ambaŭ do malkonfesos?—³⁹ en tiu tago ne demandiĝos pri sia peko homo nek genio. ⁴⁰ Kiujn el la favoraĵoj de via Sinjoro vi ambaŭ do malkonfesos? ⁴¹ Rekonigiĝos la kulpuloj pro siaj markoj, kaj ili kaptiĝos je la hartufoj kaj la piedoj. ⁴² Kiujn el la favoraĵoj de via Sinjoro vi ambaŭ do malkonfesos? ⁴³ Tiu ĉi estas inferno, kiun la kulpuloj malkonfesas. ⁴⁴ Ili ĉirkaŭiros inter ĝi kaj varmega bolanta akvo. ⁴⁵ Kiujn el la favoraĵoj de via Sinjoro vi ambaŭ do malkonfesos?

⁴⁶ Por tiu tamen, kiu timas stari antaŭ sia Sinjoro, estos du ĝardenoj—⁴⁷ kiujn el la favoraĵoj de via Sinjoro vi ambaŭ do malkonfesos?—⁴⁸ posedantaj multajn branĉojn. ⁴⁹ Kiujn el la favoroj de via Sinjoro vi ambaŭ do malkonfesos? ⁵⁰ En ambaŭ estos po du fontoj fluantaj. ⁵¹ Kiujn el la favoraĵoj de via Sinjoro vi ambaŭ do malkonfesos? ⁵² En ambaŭ, de ĉiu frukto, estos paro. ⁵³ Kiujn el la favoraĵoj de via Sinjoro vi ambaŭ do malkonfesos? ⁵⁴ (*Ili*) kuŝos sur kusenoj, kies substofaĵo estos brokaĵo, kaj la fruktoj de ambaŭ ĝardenoj estos facile atingeblaj. ⁵⁵ Kiujn el la favoraĵoj de via Sinjoro vi ambaŭ do malkonfesos? ⁵⁶ En ambaŭ estos kamaradinoj kun modestaj rigardoj; ne tuŝis ilin homo, nek genio—⁵⁷ kiujn el la favoraĵoj de via Sinjoro vi ambaŭ do malkonfesos?—⁵⁸ kvazaŭ ili estus rubenoj kaj koraloj. ⁵⁹ Kiujn el la favoraĵoj de via Sinjoro vi ambaŭ do malkonfesos? ⁶⁰ Ĉu la rekompenco por la bono estas krom bono? ⁶¹ Kiujn el la favoraĵoj de via Sinjoro vi ambaŭ do malkonfesos?

⁶² Apud ĉi tiuj du estos du ĝardenoj—⁶³ kiujn el la favoraĵoj de via Sinjoro vi ambaŭ do malkonfesos?—⁶⁴ malhelverdaj. ⁶⁵ Kiujn el la favoraĵoj de via Sinjoro vi ambaŭ do malkonfesos? ⁶⁶ En ambaŭ estos po du fontoj ŝprucantaj. ⁶⁷ Kiujn el la favoraĵoj de via Sinjoro vi ambaŭ do malkonfesos? ⁶⁸ En ambaŭ estos fruktoj, kaj daktilpalmoj, kaj granatoj. ⁶⁹ Kiujn el la favoraĵoj de via Sinjoro vi ambaŭ do malkonfesos? ⁷⁰ En ili estos bonaj agrabuloj—⁷¹ kiujn el la favoroj de via Sinjoro vi ambaŭ do malkonfesos?—⁷² belokululoj sindetenemaj en tendoj. ⁷³ Kiujn el la favoraĵoj de via Sinjoro vi ambaŭ do malkonfesos? ⁷⁴ Ne tuŝis ilin homo, nek genio—⁷⁵ kiujn el la favoraĵoj de via Sinjoro vi ambaŭ do malkonfesos?—⁷⁶ kuŝantaj sur verdaj kusenoj kaj belegaj tapiŝoj. ⁷⁷ Kiujn el la favoraĵoj de via Sinjoro vi ambaŭ do

malkonfesos? ⁷⁸ Beniĝas la nomo de via Sinjoro, Posedanto de la majesteco kaj de la honoro.

31. *Ath-thalaqāni*, „du pu pezuloj,“ laŭvorte signifas „la du pezaj,“ kaj interpretiĝas kiel „du mondoj“ aŭ „du partioj,“ aŭ „vi ambaŭ pezaj per peko,“ „vi ambaŭ ŝarĝita de peko,“ ali-vorte la homo kaj la genio.

35. *Nuḥāsun*, „fumo,“ ankaŭ povas signifi „latuno“ aŭ „fandita latuno,“ kaj tiel la fumo de fandita latuno.

37. *Dabīn*, „pleniĝos,“ ankaŭ eblas signifi „oleo,“ aŭ „brulita oleo.“

56. Laŭvorte „limigantinoj siajn rigardojn.“

L A E K S E D Z I Ĝ O

*At-Talāq, ĉe Medino**Je la nomo de Dio, la Gracema, la Kompatema*

¹ Ho Profeto! Kiam (*iu ajn el*) vi eksedziĝas de virinojn, eksedziĝu de ili dum ilia periodo (*de atendo*), kaj kalkulu la periodon, kaj estu virtaj antaŭ Dio, via Sinjoro. Ne forpelu ilin el iliaj domoj, kaj ili ne foriru, krom se ili faras evidentan abomenaĵon. Tiuj estas la baroj de Dio. Kaj kiu transpaŝas la barojn de Dio, certe tiu traktas sin mem maljuste. Vi ne scias, eble Dio poste estigos aferon. ² Kaj kiam pasis ilia periodo, reprenu ilin ĝentile aŭ disiĝu de ili ĝentile. Kaj prenu el vi du justulojn kiel atestantojn kaj fondu la ateston por Dio. Per tio admoniĝas kiu kredas je Dio kaj la fina tago. Kaj kiu estas virta antaŭ Dio, por tiu Li estigos eliron. ³ Li provizos lin, de kie li ne supozas. Kaj kiu konfidas je Dio, Li sufiĉas por tiu. Dio ja plenumas Sian ordonon. Certe Dio estigos mezuron por ĉio. ⁴ Kaj tiuj, kiuj ne plu atendas la monataĵon el viaj virinoj, se vi dubas, iliaj periodo estas tri monatoj, ankaŭ tiuj, kiuj ne havas la monataĵon. Kaj tiuj, kiuj estas gravedaj, ilia periodo estas ĝis ili senŝarĝiĝas de siaj ŝarĝoj. Kaj kiu estas virta antaŭ Dio, Li estigos facilon por liaj aferoj. ⁵ Tiu estas la ordono de Dio, kiun Li sendis malsupren al vi. Kaj kiu estas virta antaŭ Dio, Li forprenos liajn pekojn de li kaj pligrandigos lian rekompencon por li. ⁶ Lasu ilin loĝi, kie vi loĝas, laŭ viaj ebloj, kaj ne afliktu ilin por spertigi al ili malabundon. Se ili estas gravedulinoj, elspezu por ili, ĝis ili senŝarĝiĝos de siaj ŝarĝoj. Se ili mamnutras (*infanon*) por vi, donu al ili ilian rekompencon, kaj konsiliĝu inter vi ĝentile. Sed se vi malkonsentas, aliulino do mamnutru por vi. ⁷ Tiu, kiu havas abundon, elspezu laŭ sia abundo. Kaj kiu havas provizaĵon limigitan, tiu elspezu laŭ tio, kion Dio donis al li. Dio ne postulas de animo, krom kion Li donis al ĝi. Dio estigos facilon post malfacilon.

⁸ Kaj kiom multaj urboj kontraŭstaris la ordonon de sia Sinjoro kaj de Liaj Senditoj, kaj Li do respondecigis ilin severe kaj punis ilin per grava

puno.⁹ Kaj ili do gustumis la malbona sekvo de sia konduto, kaj la fino de sia konduto estis perdo.¹⁰ Dio pretigis por ili severan punon, do estu virtaj antaŭ Dio, ho vi, kiuj estas prudentaj, kiuj kredas. Certe Dio sendis malsupren al vi memorigon,¹¹ senditon, kiu proklamas al vi klarajn signojn de Dio, por konduki tiujn, kiuj kredas kaj faras justaĵojn el la mallumego al la lumo. Kaj kiu kredas je Dio kaj faras justaĵojn, Li kondukos tiun en ĝardenojn, sub kiuj fluas riveroj; li restu tie daŭre. Dio vere konsentis al li bonegan provizaĵon.¹² Estas Dio, kiu kreis sep ĉielojn kaj ilian similaĵon (*sur*) la tero. La ordono sendiĝas malsupren inter ilin, por ke vi eksciu, ke certe Dio estas kapabla super ĉio, kaj ke Li ĉirkaŭas ĉion per scio.

1. *Ṭallaqtumu* „vi eksedziĝas,“ referas al *ṭalāq* aŭ la geeksedziĝo, kiu laŭvorte signifas „ellasado (*de edzino el ligo*).“ La edzo komencas ĝin laŭ tradicio, kontraste al *khul'*, „demetado (*de edzo*),“ kiun la edzino komencas. En la dua, la edzino kelkokaze rezignas sian doton al la edzo.

LA ENVOLVIĜO

*At-Takwīr, ĉe Mekko**Je la nomo de Dio, la Gracema, la Kompatema*

¹ Kiam la suno envolviĝos, ² kaj kiam la steloj displonĝos, ³ kaj kiam la montoj forpeliĝos, ⁴ kaj kiam la gravedaj kamelinoj forlasiĝos, ⁵ kaj kiam la bestoj kolektiĝos, ⁶ kaj kiam la maroj pleniĝos, ⁷ kaj kiam la animoj parigiĝos ⁸ kaj kiam la enterigitino demandiĝos, ⁹ pro kiu peko ŝi mortigiĝis, ¹⁰ kaj kiam la skribaĵoj malvolviĝos, ¹¹ kaj kiam la ĉielo malfermiĝos, ¹² kaj kiam la fajro de la infero incitiĝos, ¹³ kaj kiam la paradizo alproksimiĝos, ¹⁴ scios ĉiu animo, kion ĝi kaŭzis. ¹⁵ Ne! Mi ĵuras per la retiriĝantaj, ¹⁶ la kurantaj, la kaŝiĝantaj, ¹⁷ kaj per la nokto, kiam ĝi ekforiras, ¹⁸ kaj per la matenruĝo, kiam ĝi ekspiras, ¹⁹ tio estas la vorto de nobla Sendito, ²⁰ posedanto de potenco, fortika kun la Posedanto de la Trono, ²¹ obeinda, fidinda. ²² Via kunulo ne estas freneza, ²³ kaj li vere vidis lin ĉe la horizonto hela, ²⁴ kaj li ne estas avara pri la mistero. ²⁵ Kaj ĉi tio ne estas la vorto de Satano, la ŝtonumita. ²⁶ Kien do vi iras? ²⁷ Ĉi tio estas nur memorigo por la mondoj, ²⁸ por tiuj el vi, kiuj volas iri rekte, ²⁹ sed vi volos nur tion, kion volas Dio, la Sinjoro de la mondoj.

2. *Inkadarat*, „displonĝos,“ ankaŭ iam interpretiĝas kiel „malheliĝos.“

4. *Ishār*, „gravedaj kamelinoj,“ de la plurala formo de „ashara,“ „dek,“ referas al la kamelinoj, kiuj estas delonge graveda dum ĉirkaŭ dek monatoj el la gravedeco de kamelino, kiu estas pli longa ol jaro.

6. *Sujjirat*, „pleniĝos,“ ankaŭ kompreniĝas kiel „superfluiĝos,“ „pleniĝos je fajro“ aŭ „bruliĝos.“

7. Interpretiĝas kiel „...parigiĝas kun siaj korpoj,“ „kun siaj agoj,“ aŭ „en du grupojn.“

8. *Maw'ūdātu*, „enterigitino,“ referencas la antaŭislama mortigo de bebinojn per enterigi ilin vivantan. La karaktero de tia praktiko disputiĝas.

10. *Šuħufu*, „skribaĵoj,“ en la eskatologia kunteksto opini referi al la registro de faroj.

15–16 „la retiriĝantaj, la kurantaj, la kaŝiĝantaj,“ referas al la planedoj kaj siaj ciklaj orbitoj.

25. *Rajīm*, „ŝtonumita,“ ankaŭ kompreniĝas kiel „forpelita“ aŭ „malbenita.“

LA SIGNOJ DE LA ZODIAKO

Al-Burūj, ĉe Mekko

Je la nomo de Dio, la Gracema, la Kompatema

¹ Per la ĉielo plena je la signoj de la zodiako, ² per la tago promesita, ³ per la atestanto kaj la atestato, ⁴ pereu la kunuloj de la fosaĵo, ⁵ de la fajro plena je brulaĵo! ⁶ Kiam ili sidis ĉirkaŭ ĝi, ili estis atestantoj al tio, kion ili faris kontraŭ la kredantoj. ⁸ Kaj ili venĝis kontraŭ ili nur ĉar ili kredis je Dio, la Potenca, la Laŭdinda, Tiu, ⁹ al kiu apartenas la regno de la ĉieloj kaj la tero. Kaj Dio estas atestanto de ĉio. ¹⁰ Tiuj, kiuj persekutis la kredantojn kaj la kredantinojn kaj ne poste pentis, por ili estos ja puno de la infero, kaj por ili estos puno de la brulado. ¹¹ Tiuj, kiuj kredas kaj faras justaĵojn, por ili estos ja ĝardenoj, sub kiuj fluas riveroj; tio estas la granda triumfo. ¹² La tenego de Dio estas ja severa. ¹³ Estas Li, kiu ja estigas kaj revenigas, ¹⁴ kaj Li estas la Pardonema, la Amema, ¹⁵ la Posedanto de la Trono, la Glora, ¹⁶ la Faranto de tio, kion Li deziras. ¹⁷ Ĉu atingis vin la rakonto de la trupoj ¹⁸ de Faraono kaj de Tamud? ¹⁹ Ne! Tiuj, kiuj forĵuras, ili estas malkonfesemaj. ²⁰ Sed de malantaŭ ili Dio estas ĉirkaŭanto. ²¹ Ne! Tiu ĉi estas Recito glora ²² en Tabelo gardata.

1. *Al-burūj* „la signoj de la zodiako,“ laŭvorte signifas „turoj,“ analoge al la „domoj“ de la luno aŭ la „signoj“ de la zodiako. Ili ĉiuj indikas konstelaciojn, kiuj montras astronomiajn kaj astrologiajn diviziojn de la ĉieloj.

4. *Qutila* „pereu (*ili*),“ laŭvorte „li mortigiĝis,“ estas idiotismo de malestimo kaj kondamno, do oni ofte tradukas ĝin kiel „malbeniĝu li“ aŭ simila esprimo.

LA NOKTA VIZITANTO

*At-Ṭāriq, ĉe Mekko**Je la nomo de Dio, la Gracema, la Kompatema*

¹ Per la ĉielo kaj la nokta vizitanto,—² kaj kio sciigus al vi, kio estas la nokta vizitanto? ³ (*Ĝi estas*) la stelo penetrante brila—⁴ sur ĉiu animo estas gardanto. ⁵ Rigardu do la homo, el kio li kreĝis; ⁶ li kreĝis el fluaĵo elŝprucita, ⁷ elirante el inter la lumbo kaj la ripoj: ⁸ Li havas ja la povon revenigi lin. ⁹ En tago, en kiu la sekretoj proviĝos, ¹⁰ li havos nek forton nek helpanton. ¹¹ Per la ĉielo, kiu revenigas (*la pluvon*), ¹² kaj la tero, kiu fendiĝas (*je kreskaĵoj*), ¹³ ĝi estas ja decida vorto, ¹⁴ kaj ĝi ne estas por bagateliĝi. ¹⁵ Ili ja projektas, ¹⁶ sed Mi projektas. ¹⁷ Do ripozigu la forĵurantojn, lasu ilin iomete.

1. *Ṭāriqi*, „nokta vizitanto,“ venis de *ṭaraqa*, „frapi,“ ĉar nokte la porto de domo estus fermita, devigante frapi por peti eniron. Tiel *ṭāriq* referas al tio, kio venas nokte, kaj kutime kompreniĝas signifi „nokta stelo,“ aŭ „matena stelo,“ ĉar ĝi aperas je la fino de la nokto.

4. Laŭvorte, „Ne estas animo sed, (*ke estas*) gardanto sur ĝi.“

11. *Bayni ŝ-ŝulbi wal-tarā'ibi*, „inter la lumbo kaj la ripoj,“ ŝajne ĉu referas al homo eliranta el la utero, aŭ pli kutime eŭfemisme referas al la spermo eliranta el la generaj organoj. Aldone *ŝulbi*, „lumbo,“ ankaŭ poveble signifi „spino“ pli ĝenerale.

SURAO 90A

LA LANDO

Al-Balad, ĉe Mekko

Je la nomo de Dio, la Gracema, la Kompatema

¹ Ne! Mi ĵuras per ĉi tiu lando, ² kaj vi (*ho Profeto*) estas liberulo en ĉi tiu lando, ³ kaj per la generanto kaj tiu, kiun li generis, ⁴ Ni ja kreis la homon en aflikta peno. ⁵ Ĉu li pensas, ke neniuj havas povon sur li? ⁶ Li diras, „Mi malŝparis multajn riĉaĵojn!“ ⁷ Ĉu li pensas, ke neniuj vidas lin? ⁸ Ĉu Ni ne faris por li du okulojn, ⁹ kaj langon, kaj du lipojn, ¹⁰ kaj montris al li la du vojojn? ¹ Sed li ne provis la krutan vojon. ¹² Kaj kio sciigus al vi, kio estas la kruta vojo? ¹³ (*Ĝi estas*) liberigo de sklavo, ¹⁴ aŭ nutrado, en tago de malsatego, ¹⁵ de orfo de proksima parenco, ¹⁶ aŭ de senhavulo sur la polvo. ¹⁷ Poste li estos el tiuj, kiuj kredas, kaj reciproke konsilas al persisto kaj reciproke konsilas al kompatato. ¹⁸ Tiuj estas kunuloj de la dekstra flanko. ¹⁹ Sed tiuj, kiuj forĵuras Niajn signojn, ili estas kunuloj de la maldekstra flanko. ²⁰ Sur ili estos fajro ĉirkaŭfermanta.

1. *Balad*, „lando,“ referas al ia ajn teritorio aŭ dividaĵo de lando, kiel nacio, ŝtato, regiono, providenco, aŭ ĉi-okaze urbo. La ĝenerala interkonsento estas, ke *hadhā balad*, „ĉi tiu lando,“ referas al Mekko.

2. *Ĥillu*, „liberulo,“ referas al ne nur tiu, kiu ne estas sklavo, sed tiu, kiu libere loĝas en teritorio, kontraste al sklavo, fremdulo, pli kiel civitano.

3. *Wālidin wamā walada*, „la generanto kaj tiu, kiun li generis,“ interpretiĝas referi al Adam kaj la homaro, Abraham kaj Iŝmael, aŭ la patro kaj la filo ĝenerale.

13. *Raqabatin*, laŭlitere „kolo (*de sklavo*).“

16. *Matrabatin*, „polvo,“ laŭlitere estas „mizero,“ kvazaŭ sur la polvo, aŭ „senhaveco.“

SURAO 91A

LA SUNO

Ash-Shams, ĉe Mekko

Je la nomo de Dio, la Gracema, la Kompatema

¹ Per la suno kaj sia brileco, ² per la luno, kiam li sekvas ŝin, ³ per la tago, kiam ĝi senvalas ŝin, ⁴ per la nokto, kiam ĝi vualas ŝin, ⁵ per la ĉielo, kaj kiu ĝin konstruis, ⁶ per la tero, kaj kiu ĝin etendis, ⁷ per la animo, kaj kiu ĝin harmoniigis, ⁸ kaj enspiris en ĝin la malbonecon kaj la virton: ⁹ ja sukcesas tiu, kiu purigas ĝin, ¹⁰ kaj ja malsukcesas tiu, kiu enterigas ĝin. ¹¹ Tamud malkonfesis per sia ribelemo, ¹² kiam ekstaris la plej mizera el ili. ¹³ Tiam diris al ili la Sendito de Dio: „(Ne ĝenu) la kamelinon de Dio nek ŝia trinkaĵon!“ ¹⁴ Ili tamen malkonfesis lin kaj buĉis ŝin, do sia Sinjoro detruis ilin pro iliaj pekoj, kaj Li ilin ebenigis. ¹⁵ Kaj Li ne timas la sekvojn.

2. Laŭ araba gramatiko la suno kaj la luno estas ina kaj vira respektive. Eŭroplingvaj tradukaĵoj atribuas al ili inversajn genrojn, sed la originala genro sin konservas ĉi tie.

SURAO 93A

LA BRILA ANTAŬTAGMEZO

Ad-Duḥā, ĉe Mekko

Je la nomo de Dio, la Gracema, la Kompatema

¹ Per la brila antaŭtagmezo, ² kaj la nokto, kiam ĝi etendiĝas, ³ (*ho Profeto*,) via Sinjoro nek forlasis vin nek koleras, ⁴ kaj la venonta estos pli bona ol la unua, ⁵ kaj via Sinjoro ja donos al vi, kaj vi estos kontenta. ⁶ Ĉu Li ne trovis vin orfo kaj gastigis vin? ⁷ Kaj Li trovis vin vaganta kaj gvidis vin, ⁸ kaj Li trovis vin malriĉa kaj sufiĉigis vin. ⁹ Do pri la orfo, ne subpremu, ¹⁰ kaj pri la petanto, ne forpelu, ¹¹ kaj pri la favoro de via Sinjoro, rakontu.

2. *Sajā*, „etendiĝas,“ laŭlitere „kovras,“ ankaŭ interpretiĝas kiel „kvietiĝas.“

9. Ibn Mas‘ūd alternative uzis la prononcon *takhar*, „riproĉu,“ anstataŭ *taqhar*, „subpremu.“

SURAO 94A

LA LARĜIGO

Ash-Sharh, ĉe Mekko

Je la nomo de Dio, la Gracema, la Kompatema

¹ (*Ho Profeto*) ĉu Ni ne larĝigis por vi vian bruston, ² kaj forprenis de vi vian ŝarĝon, ³ kiu ŝarĝis vian dorson? ⁴ Ĉu Ni ne altigis por vi vian famon? ⁵ Kaj post la malfacilo estas ja la facilo, ⁶ ja post la malfacilo estas la facilo. ⁷ Kiam do vi senŝarĝiĝas, laboru, ⁸ kaj al via Sinjoro sopiru.

1. La verbo *sharaha* ĉi tie tradukiĝas kiel „larĝigi,“ sed idiome eble signifas „senŝarĝigi,“ aŭ „trankviligi.“ Alternative oni ĝin interpretas kiel „malfermi (*por la vero*).“

SURAO 95A

LA FIGO

At-Tīn, ĉe Mekko

Je la nomo de Dio, la Gracema, la Kompatema

¹ Per la figo kaj la olivo, ² kaj la monto Sinajo, ³ kaj ĉi tiu lando sekura, ⁴ Ni ja kreis la homon en perfekta formo, ⁵ kaj poste Ni repelis lin al la plej malalta el la malaltaj, ⁶ krom tiujn, kiuj kredas kaj faras justaĵojn; por ili estos rekompenco senfina. ⁷ Kio do malkonfesigas vin post ĉi tiu juĝo? ⁸ Ĉu ne Dio estas la plej justa juĝanto?

SURAO 96A

LA BULETO

Al-'Alaq, ĉe Mekko

Je la nomo de Dio, la Gracema, la Kompatema

¹ (*Ho Profeto*) legu je la nomo de via Sinjoro, kiu kreis, ² kreis la homon el buleto. ³ Legu! Kaj via Sinjoro estas la Grandanima, ⁴ kiu instruis per la plumon, ⁵ instruis al la homo tion, kion li ne sciis. ⁶ Ne! La homo estas ja ribel-ema, ⁷ ĉar li imagas, ke li estas sendependa. ⁸ Al via Sinjoro estas ja la reveno. ⁹ Ĉu vi ne vidis tiun, kiu malhelpas ¹⁰ servanton, dum li preĝas? ¹¹ Ĉu vi vidis ĉu li estas sur (*la vojo de*) gvido ¹² aŭ ordonas la virton? ¹³ Ĉu vi vidis ĉu li malkonfesas kaj turnas sin for? ¹⁴ Ĉu li ne scias, ke Dio vidas? ¹⁵ Ne! Se li ne ĉesas, Ni ja trenos lin je lia frunthartufto, ¹⁶ mensogema pekema frunthartufto! ¹⁷ Li tiam voku sian konsilion; ¹⁸ Ni vokos la gvardiojn (*de infero*). ¹⁹ Ne! Ne obeu lin, sed terenkuŝiĝu kaj alproksimiĝu (*al Dio*).

18. *Zabāniyata*, „gvardioj,“ estas la nomo de anĝeloj kiuj gvardas inferon. Oni disputas la originon kaj etimologion de la vorto.

SURAO 107A

LA AFABLAĴO

Al-Mā'ūn, ĉe Mekko

Je la nomo de Dio, la Gracema, la Kompatema

¹ Ĉu vi vidis tiun, kiu malkonfesas la juĝon? ² Li estas tiu, kiu forpelas la orfon, ³ kaj ne instigas al la nutrado de la malriĉuloj. ⁴ Do ve al la preĝantoj, ⁵ tiuj, kiuj estas senatentaj pri sia preĝo, ⁶ tiuj, kiuj fanfaronas ⁷ kaj rifuzas afablaĵon.

7. *Mā'ūn*, „afablaĵon,“ indikas malgrandajn aferojn kaj helpon, kiun oni donas al aliaj, najbara afableco.

SURAO 108A

LA ABUNDO

Al-Kawthar, ĉe Mekko.

Je la nomo de Dio, la Gracema, la Kompatema.

¹ (*Ho Profeto*) Ni donis al vi la abundon, ² do preĝu al via Sinjoro kaj oferu.
³ Tiu, kiu malamas vin, li estas la detranĉito.

1. *Kawthar*, „abundo,“ laŭ tradicio ankaŭ aludas pri rivero en paradizo donacita al la Profeto.

13. *Abtar*, „detranĉito,“ konsideriĝas signifi tiu, kiu detranĉiĝas de boneco, vero, k.t.p. Ĝi ankaŭ povas signifi tiu, kies familio detranĉiĝas pro manko de filoj, kiel Mohamedo. Kelkaj rakontoj en la parolaj tradiciaj indikas al eble intenca dusenco.

ALDONA 1A

Allāh ar-Raḥmān ar-Raḥīm

Bismi llāhi r-raḥmāni r-raḥīmi. Tiel estas la *basmala*, la frazo, kiun oni recitas antaŭ ĉiu surao krom la naŭa. Laŭvorte, ĝi signifas „Je la nomo de *Allāh ar-Raḥmān ar-Raḥīm*,“ vokante Dion per tri el Liaj nomoj. La unua el la tri diaj nomoj, *Allāh*, ĝenerale konsideriĝas kiel mallongigo de *al-'ilāh*, „la dio,“ kaj ekvalento al la hebreaj nomoj *El* kaj *Elohim*. Eĉ antaŭ Islamo, arabaj judoj kaj kristanoj nomis Dion *Allāh*, kaj la arabaj politeistoj nomis sian kreintan dion *Allāh*.

Ne estas tamen tuta konsento inter erudiciuloj kaj tradukistoj pri la preciza signifo de la nomoj *ar-Raḥmān* kaj *ar-Raḥīm*. Ambaŭ ili venas de la radiko *Rā' Ḥā' Mīm*, kiun oni rilatas al kompato, zorgado, tenereco, k.t.p. *Ar-Raḥīm*, „la kompata,“ priskribas trajton de Dio, sed *ar-Raḥmān*, pro la diskuto pri sia difino inter fruaj islamaj erudiciuloj, ŝajnas eble esti nomo en la propra senso kaj poveble devenas de aŭ rilatas al la ŝebaa *Raḥmānān*, kiun la jemenaj judoj uzis kiel traduko de la titolo hebrea *ba-Raḥaman*, „la kompata.“ Kelkaj erudicioj tial analizas la du nomojn kiel propra nomo kaj eksplika traduko de ĝi.

Oni ankaŭ deduktas la difinon de la nomoj el ekzegezo, parolaj tradicioj, kaj iliaj gramatikaj formoj. Ekzemple en 7:156 Dio diras „Mia kompato ĉirkaŭas ĉion.“ En tradiciaĵo, la Profeto plue diris, ke Dio diris, „Mi estas Dio, kaj Mi estas la Gracema (*ar-Raḥmān*). Mi kreis la ,uteron‘ (*raḥim*), kaj Mi nomis ĝin laŭ Mia nomo. Se iu detranĉus la uteron (parencecon), Mi detranĉos tiun, sed se iu aliĝus al la utero, Mi aligos tiun al Mi.“ En alia Li supozite diris, „Mia kompato (*raḥmah*) ja superas sur Mia kolerero.“ Tiaj priskriboj reflektas la priskribo de graco, la kompato, kiun oni donas sendepende de la merito de la ricevanto. Aldone gramatikistoj analizis la morfologion de la vortoj, kaj ili klasifikis *ar-Raḥmān* kiel substantivo, kiu priskribas la ekcesan aŭ superlativan ŝtaton de la subjekto, kaj *ar-Raḥim* kiel substantivo, kiu priskribas la karakteran faradon aŭ agadon de la subjekto. Laŭ tiuj interpretoj, Dio sekve estas *ar-Raḥmān*, kies kompato estas sen-

kondiĉa kiel la zorgo de utero, ĉirkaŭas ĉion, kaj estas neforigebla eco de Dio. Kontraste, Dio ankaŭ estas *Ar-Raḥīm*, kiu intence kaj partikulare kofavoras la kredantojn kaj la justulojn.

La nomoj tradukiĝas ĉi tie kiel la Gracema kaj la Kompatema por esperimi la plej superan provizadon de kompato senmerite, kiun *ar-Raḥmān* esprimas, kaj la partikularan pardoneman inklinon, kiun *ar-Raḥīm* esprimas.